

# FINSTADIAJ MALSANULOJ

Artikolo publikigita en la revuo Adista n.62 de la 10a de septembro 2011

Pentis Judaso, la perfidulo, kiam li vidis ke Jesuo estis kondamnita (Mt.27,3). Konvertiĝis eĉ la personoj el klasoj kiujn oni opiniis nepre perditaj, kiaj la impostistoj kaj la publikulinoj, sed la pastra kasto nek pentas nek konvertiĝas. La religiestroj, fakte, estas tute rezistaj al la mesaĝo de Jesuo. Tiu "bona novaĝo", kiu por aliaj homoj estas fonto de vivo, por ili estas minaco por iliaj privilegioj kaj por ilia povo. Kiam Jesuo, la "Dio kun ni" (Mt.1,23), sin turnas al la eminentuloj de la popolo, liajn vortojn ne nur oni ne akceptas, sed eĉ ili nenion alian faras ol plifortigi la onian mortigan malamon.

Kiel okazis la lastan fojon kiam Jesuo sin turnis al ĉefpastroj kaj al pliaĝuloj de la la popolo, la sinedrianoj, kaj Li kuraĝis nomi la sanktejon "kavernon de rabistoj" (Mt. 21,13). Koleriĝintaj la ĉefpastroj pridemandis Lin per kia aŭtoritato Li agis, kaj Jesuo, per lerta parolturno ilin fermis en la angulon, demandante al ili per kia aŭtoritato estis aginta Sankta Johano la Baptisto. Jesuo sciis ke la ĉefpastroj ne povas respondi. Fakte, se ili estus asertintaj ke la aŭtoritato de Sankta Johano devenis el la ĉielo, Jesuo estus senpere demandinta al ili, kiel do ili ne kredis al li. Se, male, ili estus respondintaj ke la Baptisto agis nur per la simpla homa aŭtoritato, ili estus devintaj alfronti la popolamason, kiu taksis Sanktan Johanon profeto (Mt. 21, 23 -27). La ĉefpastroj ne povis respondi ĉar kio kaŭzis ilian agadon estis la ununura dio kiun ili adoris, nome, la trezoro de la templo, la mamono kiu estis forŝovinta la laŭleĝan Sinjoron el lia domo, ŝanĝinte ĝin en kavernon de rabistoj. La diaĝo kiun adoris la pastra kasto nomiĝas avantaĝo kaj ĉio kion ĝi faras kaj diras celas nur al ĝia avantaĝo kaj persona profito. Kaj estas pro ilia profito mem ke la ĉefpastroj kaj la pliaĝuloj ne respondas, ĉar kia ajn respondo ilin endanĝerigos.

Kaj ankaŭ ne Jesuo respondas al ili. Sed poste Li komencas ataki la plej aŭtoritatajn religiulojn instigante ilin per mallonga sed fulme mortiga parabolo, kiu ilin devigas sin esprimi kaj tiamaniere malkovri ilian sintenon.

En tiu ĉi parabolo Jesuo prezentas du filojn, kiuj post la alvoko de la patro ke ili iru labori en la vitejo, respondas malsammaniere. La unua dekomence rifuzas, sed poste, pentinte, li iras. La dua filo, fidela kaj fervora respondas: "Jes ja!", sed poste li tute ne iras tien. Kiu el la du faris la volon de la Patro? Jesuo demandas al la ĉefpastroj. Kaj tiuj ĉi respondas "la unua" (Mt.21,31). Plej bone estus estinta por ili se ankaŭ ĉifoje ili estus respondintaj: "Ni tion ne scias" (Mt. 21,27). Fakte dum en la konduto de la unua filo, tiu malinklina, kiu poste sin montras obeema, Jesuo ekvidis la sintenon de la impostistoj kaj de la prostitutinoj kiuj kredis al Sankta Johano, en la sinteno de la dua filo, tiu obeema per siaj vortoj sed ne per la agoj, Jesuo evidentigis la konduton de la ĉefreligiuloj, de tiuj kiuj laŭdis la Sinjoron per siaj lipoj, dum iliaj koroj estis malproksime de Li (Mt. 15,8).

Al la ĉefpastroj kaj al la pliaĝuloj, kiuj malestimis la impostistojn kaj la publikulinojn, klasojn de pekuloj kiujn ili taksis respondecaj pro la ne okazinta revelacio de la regno de Dio, Jesuo havigas averton ke tiuj ĉi homoj ne nur antaŭiris ilin, sed ili prenis ilian lokon en la regno. La pekuloj, eĉ pasigante maljustan vivon, fakte kredis al Sankta Johano, kiun ili taksis kiel homon de Dio, kaj la ĉefreligiuloj tion ne faris. La Sinjoro povis reakiri la « perditajn ŝafojn de la domo de Izrael » (Mt.10,6), sed Li nenion povas fari por la pastroj kiuj perdiĝis estante kuntrenitaj en la ruiniga drivo de ilia ambicio kaj aroganteco, neripareble malproksime de tiu popolamaso kiun ili estis vokataj servi. La ĉefreligiuloj estas finstadiaj malsanuloj je povo, nur koncentriĝintaj sur sin mem kaj sur siajn privilegiojn, pro kies defendo ili estas pretaj ĉion fari, eĉ murdi la Filon de Dio.  
"Ĉi tiu estas la heredonto; venu, ni lin mortigu, kaj prenu lian heredaĵon!" (Mt. 21,38).

**Alberto Maggi**